Kulturdomo de Esperanto

Kastelo

Greziljono

programo somero 2010
17 julio – 14 aŭgusto

17 – 24 julio	**Daniel Biro-Walker**	*vizito en Esperantio*
	Jean-Luc Kristos	*parola komunikado en luda etoso*
	Tomasz Chmielik	*tradukado-ateliero pri verkoj de Privat*
	Patrick Lagrange	*astronomio, observi la noktan ĉielon…*
	Jean-Luc Kristos	*kantoj kaj dancoj*
24 – 31 julio	**Christophe Chazarein**	*komenc-kurso per rekta kaj luda metodo*
	Jean-Luc Kristos	*parola komunikado en luda etoso*
	Aurora Bute	*tekst-studado, gramatiko, konversacio*
	Tomasz Chmielik	*tradukado-ateliero pri verkoj de Privat*
	Jean-Luc Kristos	*kantoj kaj dancoj*
31 julio – 7 aŭgusto	**Thierry Saladin**	*la bazoj de Esperanto per la Cseh metodo*
	Georgo Handzlik	*praktiki konversacion, kanti…*
	Tomasz Chmielik	*tradukado-ateliero pri verkoj de Privat*
	Nina Korjenevskaia	*teatro: preparado de spektaklo por vendredo*
	Caroline Mauboussin	*bindado: bindi sian propran libron*
	Eida Messias Lima	*brazilaj dancoj: samba, forró*
7 – 14 aŭgusto	**Evgeni Georgiev**	*komenc-kurso per la Cseh metodo*
	Nina Korjenevskaia	*plibonigi sian praktikadon de Esperanto*
	François Lo Jacomo	*provi la Esperanto-ekzamenojn*
	François Lo Jacomo	*ludo pri lingva diverseco « Dollmätsch »*

30 julio
5 kaj 8 aŭgusto 3 teatraj prezentoj : **Ludoviko Lazaro**, de **Georgo Handzlik**

informoj, aliĝoj:

+33 (0)9 51 64 10 34 ***www.gresillon.org***

Komencantoj

Por la scivolemaj komencantoj, aŭ la ne-esperantistoj, **Daniel Biro-Walker** prezentos, laŭ ne-lerneja stilo, la bazojn de la lingvo kaj la mondon de Esperanto: historio, literaturo, asocioj, forto laŭ geografio…

Daniel Biro-Walker

Christophe Chazarein

La juna franco **Christophe Chazarein**, kiu revenas el Bialystok, kie li laboris dum unu jaro por Esperanto, instruos al vi kiel komuniki per rekta kaj luda metodo.

La rekta metodo (per kiu oni rekte parolas Esperanton al komencantoj) estis enkondukita ĉirkaŭ 1920 de Andreo Cseh, kaj estas tiu metodo kiun uzos **Thierry Saladin**, kuracisto, kaj **Evgeni Georgiev**, bulgara filologo kaj ĵurnalisto, inter la redaktantoj de la revuo *Monato*.

Evgeni Georgiev

Thierry Saladin

Progresantoj

Se vi jam konas la bazojn de Esperanto sed bezonas praktiki kaj plibonigi iujn gramatikaĵojn, **Jean-Luc Kristos** proponos al vi konversaciojn, ludojn, poezion… Dum la dua semajno, **Aurora Bute** proponos komentadon de tekstoj, gramatikon kaj konversacion por la progresantoj. **Georgo Handzlik** enkondukos ankaŭ kantojn sed lia kurso same kiel tiu de **Nina Korjenevskaia**, celos praktikadon de Esperanto.

Nina Korjenevskaia

Aurora Bute

Tomasz Chmielik

Le pola filologo **Tomasz Chmielik**, kiu instruas Esperanto-literaturon en Universitato de Poznan, dum dudek jaroj kunigis kaj elektis artikolojn de Edmond Privat kiuj aperis en Svisio. Dum tri semajnoj ĉi-jare, kaj dum la sekvaj jaroj, li proponos al la spertaj franclingvaj Esperantistoj traduki tiujn verkojn celante eldonadon.

Tomasz Chmielik

Ekzamenoj

Greziljono estis dum longa periodo la ĉefa ekzamen-centro en Francio. Inter la malnovaj ekzamenoj de la Franca Esperanto Instituto kaj la Eŭropa referenc-kadro, **François Lo Jacomo¸** direktoro de la francaj ekzamenoj de 1989 ĝis 2001, proponos al la spertaj franclingvaj esperantistoj studi tiun evoluon per ekzemploj de aŭtentaj ekzamen-provoj.

Georgo Handzlik

Poeto, kantisto, eldonisto kaj instruisto de Esperanto, la Polandano **Georgo Handzlik** proponos ankaŭ muzikan programon kaj ĉefe, dum la dua, tria kaj kvara semajnoj, la teatraĵon *Ludoviko Lazaro* kiun li verkis por la universala kongreso de 2009. Ene de unu horo kaj kvarono, vi malkovros multajn travivaĵojn de Zamenhof en Bialystok, Varsovio, Moskvo… de la naskiĝo de Esperanto, ĝis la kongreso de Bulonjo-ĉe-maro…



Georgo Handzlik aktoro

François Lo Jacomo

Teatro

Estas pri teatro ke **Nina Korjenevskaia** fariĝis doktoro. Ŝi proponos dum la tria semajno prepari erojn de teatro por prezenti ilin dum la lasta vespero. Dum tiu teatra semajno, okazos prelego pri historio de TESPA, Teatro Esperanto de Parizo.

Bindado

Ĉu vi jam bindis vian propran libron ? La bindado-ateliero de Greziljono ebligos vin fari tion, gvidata de **Caroline Mauboussin**.

bindado kun Caroline Mauboussin

Astronomio

Se vi pretas veki iom malfrue, vi povos observi la stelojn kaj la planedojn per du astronomiaj lornoj . **Patrick Lagrange**, astronomo malkovrigos al vi sian pasion por la universo kiu ĉirkaŭigas nin .

Jean-Luc Kristos

Patrick Lagrange

Aliaj aktivaĵoj

Kantoj de Gainsbourg, Bécaud… tradukitaj al Esperanto, kiujn instruos al vi **Jean-Luc Kristos**, brazilaj dancoj kun **Eida Messias Lima**, aliaj aktivaĵoj estos proponitaj… Adapto al Esperanto de ludo Dollmätsch, celita al malkovro de la lingva diverseco…